

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Vi aŭdas prelegaron de Charles Ecabert pri la svisa edukisto Henriko Pestalozzi.

A.- « Dum dekok jaroj, de 1780 ĝis 1798, Pestalozzi sekve de la fiasko de Neuhof, ne plu okupiĝis pri edukado, nek pri infanaro, kaj estis, se tiel oni povas diri, malfidela al sia natura inklino kaj vera vokiĝo.

Cl.- En 1798 tragikaj historiaj cirkonstancoj lin remetis sur la bonan vojon. La francaj revoluciaj armeoj estis invadintaj la helvetian teritorion : la malvenkoj ĉe Neuenegg kaj Grauholz apud Berno estis signitaj la disfalon de la malnova Konfederacio. Sed la praaj kantonoj plue rezistis kaj la soldataro de generalo de Corbineaŭ sange dispremegis la homojn de la kanto Nidvaldo.

A.- Ĉio estis bruligita aŭ mortpafita. Pluraj centoj da infanoj fuĝis kaj forvadis sur la montaro. Pestalozzi aŭskultante nur la voĉon de sia koro akceptis starigi por ili orfejon en la ĉefurbo Stanz. Tuj li retrovis la ekvilibron kaj pacon de la turmentita animo.

Cl.- « *La afero iras bonege, li skribas al baronino de Hallwil, mi forigas la honton de mia vivo... Dum multaj jaroj mi vivis en la malespero kaj furiozo de mia nepriskribebla mizero... sed nun mi estas elirigita el mia koto, mi refariĝas homo.* »

A.- Li havis ĉirkaŭ si 80 infanojn. Li skribas :

Cl.- « *Multaj alvenis kun skabio tiel enradikinta, ke ili ne plu povis marŝi, multaj kun la kapo truita, multaj preskaŭ ĉifonvestitaj, plenaj je fi-insektoj, malgrasaj kiel skeletoj, flavkoloraj, ridaĉantaj kun angoraj okuloj kaj frunto faltita pro malfido kaj zorgo.* »

A.- Senprokraste Pestalozzi eklaboras, purigas la vundojn, kuracas la febrojn, instruas, nutras, vestas la geetulojn, helpata nur de unu mastrumantino kaj de unu 58-jara senspertulo. Fakte li bezonis neniun alian. Li volis esti sola por plenumi sian taskon, ekster la komuna mondo, ĉar lia universo estis tute aparta. Li skribis :

Cl.- « *Mi estis sola kun ili de mateno ĝis vespero. El mia mano ili ricevis ĉion, kio povis plibonigi iliajn korpon kaj animon... Ili estis ekster la mondo, ekster la urbo Stanz, ili estis kun mi kaj mi kun ili.* »

A.- Jen ree kreita la mondo de la **Wohnstube**, tiu restada familia ĉambro, kiel dum lia infaneco, ideala medio por la edukado. Li skribis :

Cl.- « *Mi estis kiel patro de la malriĉuloj meze de miaj infanoj, havis neniun sciencon nek teknikan preparadon, havis nur patran forton de mia koro... La familia spirito, tiu eterna fundamento de ĉiu vera edukado disvolvis sian benitan efikon, simple, vere laŭnature, tra mia sindono kaj amo... Mia celo estis igi ilin gefratoj ; por ke la domo iĝu nure pligranda familio, bazita sur amo, justeco, moraleco.* »

A.- La metodo de Pestalozzi estas tute senpera kaj preskaŭ senvorta, ĝi konsistas esence en la kreo de vivkondiĉoj, de morala atmosfero, de subtana kaj ekzaltiga etoso, anstataŭ vanaj predikoj, aŭ nuraj admonoj. Li konsilas :

Cl.- « *Klopodu pliampleksigi la koron de viaj infanoj, miksu la amon kaj deziron al bono kun iliaj impresoj, spertoj, agado, - poste penu ilin al kutimigi al lerteco kaj sagaco, por ke ili kapablu ekzerci ofte kaj sekure sian volon, - fine kaj laste ekstraktu la danĝerajn signojn de bono kaj malbono. Ne timu la vortojn sed alligu ilin al ĉiutagaj okazaĵoj kaj atentu, ke ili*

rilatu ekskluzive tion, por ke la infanoj klare sciu, kio en kaj ĉirkaŭ ili mem okazas, kaj akiru la senton malkonfuzan pri tio, kio estas justa, morala en ilia vivo kiel en ilia agado. »

A.- Post kiam la koro estas malfaldita, la intelekto ankaŭ malfermiĝas. Pestalozzi nepre konfidis je la unueco de la persono. Necesas unue, ke la infanoj konsciis pri la naturaj vivpotencoj, pri la konstruaj fortoj, poste la inteligenteco ekscitiĝas.

Cl.- « *Mi eĉ ĉe la plej maldelikataj vidis, ke el ĉie ŝprucas la vivantaj fortoj de la naturo... Ili konsciis pri si mem kaj la lernlaciĝo malaperis el mia klaso kiel fantomo. Ili volis, povis, persistis, plenigis kaj ridis. Ilia mensostato ne estis tiu de la lernantoj, ĝi estis sento pri nekonataj fortoj eligitaj el longa dormo, sperto, kiu plialtigis ilian animon ; ili demandis sin, kion povas kaj kien kondukos ilin tiuj fortoj. »*

A.- Instruado estas antaŭ ĉio observado, juĝado, emo kaj alkitimiĝo al vero. Ĉiu frazo, ĉiu vorto respondas al io konscirea, ĉio nur parola estas mensoga kaj malestiminda. Koncentriĝu atento, ekzerciĝu memoro, poste oni pensu kaj eble parolu. En Stanz praktikiĝis la leciono pri silento kaj senmoveco 120 jarojn antaŭ la montesoriaj metodoj.

Cl.- « *Silento, diras Pestalozzi, estas la unua rimedo por ekfunkciigi aktivecon. »*

A.- Nur post tiuj koncentrigaj ekzercoj, nur post tiu zorga trejniĝo de la mensaj funkcioj, aŭ kiel oni diras de la povoj, Pestalozzi alpaŝis al la tekniko de la scio : legado, skribado, kalkulado.

Cl.- Pestalozzi enkondukis la reciprokan instruadon antaŭ Lancaster, kiu donis sian nomon al tiu metodo.

A.- Sed subite la mirakla entrepreno de Stanz ruiniĝis. Generalo Massena venkita de la aŭstro-rusoj apud Zürich, la 7-an de junio 1799, iris returnen en Nidvaldon kaj la orfejo devis iĝi milithospitaleto. Estis kvazaŭ mortigo por Pestalozzi. Tamen, kiel diris poste Rengger :

Cl.- « *Lia lernejo de malriĉuloj tie supre, sur kiu ŝvebas martiraŭreolo, iĝis lulilo de la moderna popoledukado. »*

A.- Vi aŭdis prelegon de Charles Ecabert.

Cl.- Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-